Post diversaj intertraktadoj tiu Esperanto-Ekzamenkomisiono starigis la 24an de septembro, kaj jam en tiu ĉi vintro tiu E. E. K. volas komenci funkcii.

La grupoj zorgu, ke ili havu kernon de diplomitaj anoj kaj ne preterlasu la okazon dum la vintro prepari siajn membrojn por la ekzamenoj, ĉu A ĉu B. La komisiono funkcios ĉiam kaj ĉie en Flandrujo, kie minimume dek kandidatoj sin prezentas. Por plua informoj skribu al: Lic. L. Calloens, Erembo-degemstr. 29, Aalst.

## ESPERANTO EN LA KONGRESO DE BALTLANDA KUNLABORO.

Tuj post la sendependiĝo de Baltaj popoloj (estonoj, latvoj kaj litovoj) oni komencis pensi pri ilia diproksimiĝo aŭ ec unuiĝo. Precipe aktuala lariĝis tiu problemo pro la malfortiĝo de Ligo de Nacioj kaj pro la ĉiam kreskanta minaco flanke de potencaj ŝtatoj. Oni fondis en ĉiuj tri landoj societojn, akcelantajn alproksimiĝon kaj unuiĝon de Baltaj ŝtatoj. Tiuj aranĝas ĉiujare la **Kongreson de Baltlanda Kunlaboro.**, alterne en Kaunas, Riga kaj Tallinn.

Dum tiuj kongresoj plej evidente montriĝas la neceso de internacia helplingvo, kaj tial la esperantistoj ekuzis tiun okazon por propagando de Esperanto. Jam de post tri jaroj en kadro de tiuj kongresoj oni okazigas la **Konferencojn de Baltlanda Esperantistaro.** Tiuj konferencoj ne nur pritrakts la aktualajn organizajn k. c. demandojn, sed ankaŭ penas influ la Kongresojn favore al Esperanto, partoprenante en diskutado pri la lingva demando, proponante la rezoluciojn. Nunjare ĝi proponis jenan rezolucion, **aplaŭde akceptitan de la Kongreso:**

La V-a Estona — Latva — Litova kunlabora kongreso la 11-VI-1939 en Kaunas,

**I. konsiderante kaj spertinte,**

1) ke la lingvaj baroj grave malhelpas la kunlaboradon de Baltlandaj popoloj,

- ke estonte la lingvaj malfacilaĵoj ankoraŭ pli grandigos, ĉar en la mezaj lernejoj de Baltaj landoj estas instruataj malsamaj fremdlingvoj,
- ke ne estas antaŭvidebla kaj dezirinda la lingvo de potenca popolo kiel sola interkomunikilo por baltlandanoj,

**decidas:**

rekomendi al la societoj de estona — latva — litova kunlaboro pristudi la eblecon de ekuzo de Esperanto por la interkompreniĝo de baltlandanoj kaj akceli la enkondukon de tiu lingvo kiel nedeviga instruilo en la mezlernejoj;

**II. konsiderante,**

ke en la kongresoj de Baltlanda kunlaboro estas tre dezirinda ankaŭ la aktiva partopreno de la instruistaro kiel grava popoleduka faktoro,

**decidas:**

peti la organizantojn de la venontaj kongresoj de Baltlanda kunlaboro aranĝadi ilin nur post la komenciĝo de la someraj lernejerioj.

J. Janonis.

## - Esperanto en Radio -

Aŭskultu gravan elsendon el Dublin!  
19 DECEMBRO.

KRISTNASKA TEATRAJETO PER LA RADIO.

Irlandaj Radio-stacioj dissendos speciale-verkitan teatraĵeton esperantlingvan, Mardon la 19an Decembro 1939, je la 6a p.m. G. M. T. Ĝi prezentos — laŭ simpla stilo — la Enmondiĝon de la Sinjoro Dio, komecanta per la Vizito de la Anĝelo Gabrielo kaj finante per la Adorado al l' Sankta Infano. Dublinaj Esperantistoj ludos la diversajn rolojn.

La Staciestraro esperegas, ke la samideanaro klopodos aŭskulti tiun ĉi dissendon specialan, kiu estas la plej impona jam entreprenata nialingve en Irlando.

Kie ajn eble, aŭskultu grupope (per komuna uzado de unu radio-ricevilo). Antaŭ-avizoj (pri intenco aŭskulti) kaj ricevatestoj post kaptado, estos bonvenaj ĉe Radio-Stacio, Dublin, Irlando.

La elsendo okazos ne nur per la kutima mezonda stacio (531 metroj; 100 kv.) sed ankaŭ per la eksperimenta mallongonda stacio (3127 m.; 1.5 kv.) Per tiu ĉi oni finas la 1939 programon; oni bonvenigos konsilojn, sugestojn pri temoj, ktp. por 1940. Lorcan O hUiginn, 39 Westmoreland Street, Dublin. 18-11-1939.

**URĜA PETO.** — Ni insiste petas niajn legantojn aŭskulti tiun gravan elsendon kaj poste amase skribi al la Radiostacio, Dublin, Irlando (tiu adreso aŭdiacas) gratulante, dirante vian opinion ktp. Precipe ni katolikoj devas subteni tiujn belajn katolikajn elsendojn. Sciu ke oni al ni skribis el Dublin, ke ĝis nun envenis tro malmultaj korespondadoj. Oni tial timas ke la estraro de la stacio ne plu kredos la taŭgecon de Esperanto. Do.....

## RADIO LOKSBERGEN.

Aŭskultu regule la F. U. K. E.-elsendon el Loksbergen kaj sciigu al nia sekretario viajn dezirojn ktp. Ili okazas ĉiujn 2an kaj 4an sabaton de la monato.

K. R. O. HILVERSUM.

Ĉiun dimanĉon vespere je 10.40 Esperanto-elsendo.

**14 jan.** I. K. I.-elsendo. Kredofontoj: S. Skribo kaj Tradicio de Paroĥestro Hub. Eras, Vught.

**11 febr.** I. K. I.-elsendo. **La vivoleĝo:**

Dia leĝo: naturleĝo, pozitiva leĝo.  
Homo leĝo: Eklezia leĝo, ŝtata leĝo.  
de P. C. van Hoogstraten, O. Praem. Grimbergen.  
En la aliaj dimanĉoj: aliaj prelegoj aŭ informoj pri Esperanto.

RADIO ROMO.

Stacioj 2 R O (6 m. 19.61) kaj 2 R O (9 m. 31.02):  
Lunde de 21.50 h. proks. — 22.10 h. proks. Informoj.

**Roma II (245. m.) kaj 2 R O (9 m. 31.02):**  
Sabate de 18.40 h. — 19.00 h. Turisma elsendo.

Aŭskultu, skribu al «Esperanto Voĉo» Via Montello 5, Roma, (mencianta Flandra Katolikon) kaj petu regulan elsendon de la Esperanto-eldono de ĉiuj programoj. Tiu 52 paĝa senpaga libreto enhavas certe ankaŭ aliajn por vi interesajn elsendojn.

## Overal Esperanto

BRAZILIE.

Ter gelegenheid van een postzegel tentoonstelling, gehouden te Bello-Horizonte in de staat Minas Gerais, liet het postbestuur een speciale poststempel maken met Esperantotekst, voorzien van de groene ster, waarmee ALLE poststukken werden gestempeld.

FRANKRIJK.

In verschillende postburelen en spoorwegstations ziet men al bordjes hangen met: «Esperanto parolata».

Het maandblad «La Paix» begon een speciale Esperantobladzide bij te voegen, met artikels in Esperanto.

ENGELAND.

De kommissie van Opvoeding in het graafschap Lanark, heeft het voorstel van de Schotsche Esperanto-Federatie om in eenige «post-primarieschools» (middelbaar onderwijs) bij wijze van proef Esperanto in te voeren, aangenomen.

ITALIE.

Over de stad Turijn werd een prachtig vrouwenprospektus uitgegeven in Esperanto met fotos in koperdiepdruk. Verkrijgbaar bij: Ente Provinciale per il Turismo, Torino, Italiujo.

DENEMARKEN.

Het geheele kongres van S. A. T. werd bijgewoond door burgemeester Lindhagen van Stock-

holm, die in Esperanto het Kongres toesprak en zells drie voorstellen indiende.

#### BELGIE.

Uit een brief van het Gemeentebestuur van Brugge aan het Kongreskomiteit van «Nia XXIa», kopieeren we het volgende: «Ten eerste houden wij eraan, onze sympathie voor het Esperanto uit te drukken. Bij het heruitgeven van het toeristisch vrouwblad onzer stad, enkele maanden geleden, werd beslist een Esperanto-uitgave te laten verschijnen. Wij kunnen U thans mededeelen, dat onze Dienst voor Toerisme iedere dag om dergelijke brochures wordt verzocht, wat wel degelijk het nut van dergelijke uitgave in het licht stelt».

#### NEDERLAND.

Het internationaal astronomisch Instituut «Sonneborg» te Utrecht, gebruikt regelmatig Esperanto in zijn betrekkingen met het buitenland.

De heer Nijveld in Amsterdam hield in de aula van de Amsterdamsche Universiteit een dissertatie, om de doktortitel te bekomen in de natuur- en wiskunde. De dissertatie bevatte een tamelijk grote samenvatting in Esperanto, op het einde waarvan ook deze zin: «Pro la internacia karaktero de la scienco, tre dezirinda estas la uzado de neŭtrala helplingvo. Esperanto estas taŭga por tiu ĉi celo».

Het nieuwe programma van het «Instituut voor handelswetenschappen» en van het «Nederlandsch Kollege voor Algemeene Studieleiding» bevat ook Esperantokursussen.

In het weekblad «De Goede Tempelier» (vrijetijdschrift) verschijnen regelmatig artikels in Esperanto.

#### ESPERANTO BIJ DE GENEESKUNDE.

Volgens het «Internacia Medicina Revuo» dat te Ukkel verschijnt, geven de volgende geneeskundige tijdschriften een korte samenvatting van hun artikels in Esperanto: «Journal de Médecine de Lyon», «Bulletin de la Société Belge d'Orthopédie», «Bulletins et Mémoires de la Société de Médecine de Paris», «Le Phare Médical de Paris», «Lekarska Revuo» uit Praag en «La Medicina Katalana» uit Barcelona.

#### ESPERANTO IN DE HANDEL.

Om wille van den smeer... verschenen tot nu toe reeds: Esperantowafels, Esperantozeep, Esperantoscheermesjes, Esperantosigaren, Esperantosigarellen, Esperantobatterijen, Esperantopotlooden, Esperantozakmesken, Esperantohorloges, Esperantogummi, Esperantopennen, Esperantolikeur, Esperantowijn, Esperantolimonade, Esperantochocolade, Esperantostoelen en, last not least, Esperantoschoentekkers.

#### ESPERANTOSTRATEN EN -PLEINEN.

Reeds een vijftigtal straten, pleinen en monumenten over de geheele wereld ontvingen de naam van Esperanto of Dr. Zamenhof. Veel echter zagen in de laatste jaren hun naam veranderen in namen, die meer pasten bij de «natie», zoo gebeurde in Italië, Duitschland, Oostenrijk, Tsjecho-Slowakije, Danzig en waarschijnlijk ook reeds in Polen. En monumenten werden vernietigd.

N. B. — De titels van dag- en weekbladen en tijdschriften, die Esperantokursussen of artikels over Esperanto begonnen te publiceeren, hebben we tot nu in deze rubriek niet vermeld, hun aantal is te groot en het leit is ook voort zoo gewoon.

## Soldata Anguleto

En nomo de siaj kunsoldatoj Sinjoro Kamiel Tousseyn parolas al vi, kiuj restis hejme, pri kelkaj impresoj.

#### Karaj geamikoj,

Mi havas la honoron saluti vin ĉi tie por la unua fojo, kaj estas por mi granda ĝojo, ke mi povas fari tion.

Mi demandas al mi paroli iom pri nia mobilizo, sed estas klare, ke kiel mobilizita soldato, mi ne povas diri ĉion, kion mi ŝatus.

Bonvolu prikonsideri tiun ĉi artikolon kiel komunikon de kelkaj ideoj de mobilizito al niaj geamikoj kiuj restis hejme kaj deziras scii ion plie pri la vivo de niaj soldatoj.

Esti mobilizata kaj devigata eniri la armeon certe ne estas agrable, esti mobilizata por dua fojo estas eĉ malpli agrable.

Ni ĉiuj, kiuj jam de antaŭ kelkaj jaroj forlasis la kazemon kun ĝojo, havis tiam nur unu deziron: ne pli manipuli pafilon. Kun malpezigita koro ni pendigis niajn soldatajn vestojn en la ŝranko, esperante ke ili estos tie por ĉiam.

La ĉiutaga vivo de civitano, la libereco, la laboro, la sinklerigo, ĉio jam tute okupis nin. Ni iĝis pli kaj pli homoj, ni kreskis en aĝo, saĝo kaj sperto, ni fondis propran hejmon, ni sentis nin respondecaj pri multaj aferoj, mallonge: ni iĝis viroj. Kaj jen... ĉio finita... mobilizo... denove soldatiĝi; ĉio estas detruita. Ni surmetis niajn soldatajn vestojn kaj foriris. Ni adiaŭis ĉion, ho jes sen multa ekstera monstro, bone evitante malkaŝi niajn internajn sentojn; ni volis montri ke ĉio lasas nin indiferentaj, sed tamen turmentis nin la demando, ĉu estos ripeto de septembro 1938 aŭ ĉu daŭros dum monatoj, jaroj, ĉu ni venos en milito? Kun la firma espero esti ŝparataj de tia kruelaĵo, ni forlasis nian hejmon kaj bone konsciis ke la mobilizo ne estas ridinda ludo sed absoluta necesajo.

Kaj nun post kelkaj monatoj da mobilizo ni komencas kompreni nian respondecon: esti soldato estas devo por ni. Ni bone konscias, ke estus tre nerespondece sendi nin hejmen. Ni komprenas, ke nia stato estas necesa por permesi al niaj familioj vivi en paco.

Menciinda estas certe ankaŭ la diferenco inter la mobilizo de 1938 kaj la nuna. La mobilizo de 1938 estis ekzemplo de malordo kaj organiza neperfekteco, dum ankaŭ la malbona konduto de la soldatoj estis rimarkinda. La nuna mobilizo tamen estas el organiza kaj morala vidpunktoj multe kaj multe pli bona. La oficiroj multfoje pravas, ke ili estas kompetentaj kaj la soldatoj ĝenerale montras pli da eduko. Tamen estas ankaŭ multaj koroj, kiuj pravas ke profunda Kristana eduko estas

pli necesa ol pensas multaj tiel nomataj popolgvidantoj.

Estimataj geamikoj, vi verŝajne deziras scii plie pri la vivo de la revokitaj soldatoj.

Nia ĉiutaga okupo konsistas el gardstarado, ekzercado, fosado kpt. multe da libera tempo ni ne havas, almenaŭ nia regimento ne, aliloke povas diferenci.

La manĝaĵo iĝas pli kaj pli bona, kredu nin, ne estas por foje ŝanĝi la parolkutimon, ke ni diras tion; se la manĝaĵo ne estus bona ni silentus pri ĝi. La vivo de soldato ankaŭ ion alian entenas ol gardstari, manĝi kaj labori; ni ankaŭ devas dormi kaj tio estas ofte pli komplikita afero. Dormi en tendo ne estas agrable, precipe ne, se oni ne estas ekipita por tio, ĉar vera tendo ne estas komparebla kun nia tendvelo. Dormi sur pajlo en grenejo meze de ventega trablovado ankaŭ ne estas enviinde. Tio tamen estas jam multe pli bona. La supro de lukso estas atingata en la kazernoj, kie oni havas maldolĉajn ferajn litojn kun pajla matraco.

La bonhumoro kompreneble estas ankaŭ vivanta inter la soldatoj. Malgranda ekzemplo. En nia ĉambro estas du homoj, kiuj havas la kapon tute senhara. Dum iu nokto soldato subite interrompis la agrablan silenton per jenaj vortoj: se vi pensas, ke vi povas brilegi dum la tuta nokto kun via serĉlumo en miaj okuloj, tiam vi eraras. Sciu bone, se vi ne tuj surmetas vian ĉapon, ni malheligas vian lumon per blua farbo. Alia aldonas: en la vagonaroj, en la stratoj, ĉie la lumoj devas esti malheligitaj kaj vi povus lasi brilegi vian lunklaran kapon, sufiĉas por konigi nian lokon al ĉiuj aeroplanoj. Vi povas imagi, ke tiuj vortoj estas akceptitaj kun rideksplodo.

Kie estas soldatoj, tie oni multe ridas, multe kantas kaj faras muzikon. Muziko? Jes, en nia ĉambro ni havas eĉ orkestron, orkestron kiu superas ĉiujn aliajn, ankaŭ Mare Weber kaj Wiener bohemon. Ni havas bonegan akordionon, trombonon, klarineton, buŝharmonikon kaj du banjojn. Ni havas en nia ĉambro ankaŭ grandan artiston, sed li ne havas sian instrumenton ĉe si, nome elektrikan organon.

Kiam ni estos en formo, ni foje donos koncerton antaŭ la W. V. R. O.

Sed ree ni formetu la ŝercon. Permesu al mi aludi la koran bonvenon, kiun ni ĉie spertas ĉe la homoj. Ili klopodas servi al ni, la flandraj homoj ja havas belan proverbon: «ĉiu knabo estas infano de sia patrino». Kion oni faras por ni, tion oni deziras, ke fariĝu al aliaj propraj mobilizitoj en aliaj regionoj.

Niaj homoj komprenas, ke ni mobilizitoj ne estas revokitaj por ni mem sed por la civitanpopolo, ke ni estas je ilia servo. Kaj laŭ tiu konvinko la plejparto de la homoj agas. Ni mobilizitoj estas por tio tre dankaj; multaj el ni tamen estas foje iom malĝentilegaj, forgesas eĉ kelkfoje ĉiujn signojn de bonedukiteco, sed la civitanoj pro tio ne timu: kontraŭe ĉar tio eble estas motivo por esti eĉ pli zotga por la soldatoj, estas ja tiom da aferoj, kiuj povas senkulpiĝi tiun konduton.

Estimataj geamikoj, multaj el vi havas edzon, fraton aŭ fianĉon en la armeo. Ni ne scias kiom da tempo ni ankaŭ estas disigitaj, ni eĉ ne scias kio ni estos morgaŭ; en tiuj cirkonstancoj ni pli ol alie bezonas la reciprokajn subtenon de la amike-

co. Ĉu edziĝintaj ĉu fianĉiĝintaj, ni mobilizitoj klopodas ne nur konservi tiun korinklinon, kiun ni portas en ni, sed eĉ pligrandigi ĝin per la longdaŭra diseco. Kiam ni nun povas veni al vi, tio estas por ni multe pli signifplena ol en la ordinara civitana vivo: neniam nia hejmo estis al ni tiel kara kiel nun, neniam antaŭe ni havis tian ardan deziron revidi vin kaj resti ĉe vi, neniam antaŭe ni sentis tian zorgemon por vi, kiel nun dum la mobilizo.

Korpe ni estas longdistance disigitaj, sed spirito, anime ni klopodos pli ol iam stari ĉe vi, ni klopodos eviti ĉion, kio povas esti malhelpilo inter nia reciproka amo. Por tio ni deziras vian subtenon. Kiom multege ni ĝojas, kiam ni ricevas letereton de nia hejmo, de nia edzino, de niaj parencoj, de niaj fianĉinoj amikoj kaj konatoj; kun ĉiu letero kvazaŭ envenas io de ili mem. Per ĝi la ligo inter vi kaj ni iĝas ĉiam pli firma. Ni scias, ke oni multe preĝas por ni kaj ankaŭ en la reĝo do ni sentis nin multe pli unuigitaj, ĉar ankaŭ ni preĝas ĉiutage kun la sama intenco kiel vi.

Kiom belege estos, kiam ni povos returni hejmen, kiam ni denove estos ĉe vi, kiam ni denove reprezentos nian respondecon, denove faros nian taskon.

Dio protektu nian landon kontraŭ la milito, nia tero ankaŭ haladras la sangon de niaj mortintoj en la lasta milito. La multegaj tonbejoj donas al ni klaran bildon pri la mizero kaŭzita de la mondmilito, ne, nia lando ne povas esti mikсата en nova buĉado. Nia popolo volas pacon. Kian teruran respondecon havas tiuj, kiuj nun havas en manoj la gvidadon de nia lando; unu eraro de nia registaro povas faligi nin en la malfeliĉegon. Do en tiuj cirkonstancoj ni agu laŭ la deziroj kaj ordonoj de tiuj regantoj. Precipe ni ankaŭ multe preĝu por niaj aŭtoritatuloj, por ke ili en ĉiuj okazoj, ĉu interne de la lando ĉu ekstere, sufiĉe klare vidu por direkti niajn landon kaj popolon al kvieto kaj paco, meze de la mallacilaĵoj. Ni Esperantistoj daŭre laboru por interkompreno de la popoloj kaj popoltavoloj kaj por pli da proksimumo inter la homoj.

Mi mem, mi estas feliĉa ke mia optimismo pravis kaj ke mia fido en la prudento de niaj respondecaj ŝtatviroj praviĝis bona. Mi ne kredas, ke ekzistas en la mondo unu sola homo, kiu meritas tiun epiteton kaj tamen povus ŝarĝi sin per la terura respondeco ekbruligi la fajron de milito, ĉar li por ĉiam suferus pro la kondamno de la tuta mondo, sed mi havas ankaŭ la firman konvinkon, ke ni tute ne estas nepotencaj en la evoluado de ĉiuj tiuj problemoj. Mi invitas la kondukantojn de la popoloj, la ŝtatajn registarojn, la ŝtatvirojn, la intelektulojn kaj ĉiujn, kies spiritaj fortoj kaj potenco decidis pri la sorto de milionoj da senkulpa, laboremaj kaj simplaj homoj: donu al la popoloj tion, kion ili jam de jarcentoj plej varme postulis, en forta kaj reciproka estimo: Pacon en la intereso de la plej gravaj bonoj de la homaro, pacon por niaj patrioj, edzinoj kaj infanoj, por ke ni montriĝu dignaj tion, kion la prapatroj heredigis al ni kaj kion Dio konfidis al ni.

Permesu min, ke mi sincere danku vin en nomo de miaj kamaradoj por viaj spiritaj kaj materiaj bonfaroj al ni soldatoj.



## AL LA SOLDATOJ KAJ ILIAJ AMIKOJ.

Sekve al anonco en Morgenpost pri senpaga Esperanto kurso por soldatoj, sin anoncis 7 soldatoj de la 37-a Infanteria Regimento kaj aliaj. Laŭsperte ni scias ke soldatoj ofte estas devigataj labori en ege malfavoraj cirkonstancoj kaj sekve ni elektis la Witterijk metodon por ĝiaj mallongeco kaj malmultekosteco. Ni esperas, ke inter ili estos kelkaj kiuj iĝos fervoraj Esperantistoj kaj sekve aŭtomate ckatatos alian pli kompletan kaj pli modernan lernolibron.

Unu el la lernantoj sciigis, ke li ekspluatas la militservan tempon por koniĝi kun Esperanto, kiun li delonge estus lerninta, se ne pro la manko de tempo en la normala vivo malhelpata por tio.

Alia esprimis sian kontentecon pro la fakto, ke nia Unuiĝo sindone volas helpi la soldatojn. Estas morala subteno, kiun laŭ li la mobilizitaj multe bezonas. Li alte taksas la klopodon helpi al ili aŭdi certan intelektan nivelon en ofte materiaj kaj krudaj cirkonstancoj.

Al kelkaj el ili preĝarete Caroli kaj propagandiloj estis sendataj.

Generale ili estas regulaj kaj laboremaj lernantoj kaj kelkaj estas tre scivolemaj rilate la lingvon.

La Skelda Instruistoj Klubo sendis salutkarton, subskribitan de ĉiuj geĉeestantoj, al siaj anoj soldatoj kaj decidis sendi paketon al kvin konataj anoj kiuj soldatiĝis. Eble estas ankoraŭ aliaj.

Ĉiuj respondis, esprimante sian dankon pro la Esperantaj libroj, ĉokolado kaj cigaredoj.

S-ro V. d. Bergh sciigis ke ili ja havas migrantan bibliotekon en sia kompanio, sed ke Esperanto-libroj mankas, kvankam li jam insistis plurfoje, por ke oni aldonu kelkajn.

Ni intencas denove meti alvokon en kelkaj ĵurnaloj pri senpagaj Esperanto-kursoj. Eble la sekretariejo bezonas kelkajn helpantojn por la korektado de la ensenditaj lecionoj. Ĝi do atendas, ke kelkaj bonvolemluloj sin anoncos. Vi konas la adreson, ĉu?

Jos. Van Deun.  
Sekretario.

## VOORBEELD UIT NEDERLAND.

Van 27 tot 30 Juli werd in de Katholieke Militairen-vereeniging te Soestenberg een tentoonstelling van Esperantaĵoj gehouden, die veel bezoek trok. Reeds op den dag der opening kon worden overgegaan tot oprichting van een club van 19 katholieke militairen-Esperantobeoefenaars. Dezelfde tentoonstelling werd gehouden van 3 tot 6 Augustus in de Katholieke Militairen-vereeniging te Amersfoort. Na een krachtig woordje van den Directeur Kapelaan H. Kerkhofs, die het nut van Esperanto voor den Katholiek uiteenzette, kon ook hier een club worden gevormd van 12 personen. Promotor van deze beide tentoonstellingen was de heer C. de Groot Jr. lid van «Pastor Emile Peltier» te Amersfoort, en thans te Soestenberg in garnizoen. Verheugend mogen we het verschijnsel noemen, dat de grootst mogelijke medewerking en steun werd verkregen, reeds op het eerste verzoek, van den Majoor-Aalmoezenier H. van Straelen.

(Uit «Nederlanda Katoliko»).

## EN LA F.U.K.E.-FAMILIO

## Kondolencoj.

Ni esprimas niajn korajn kaj kristanajn kunsentojn al nia fervora propagandisto, Kamiel Dubois en Bilzen, en la malĝojego, kiu trafis lin pro la morto de lia patro en la aĝo de 57 jaroj. Niajn preĝojn por la mortinto kaj la postvivantoj.


## Naskiĝoj.

Nia delegito en Leuven, Petro de Fraye-Coppens, aĉetis sian trian infanon, kiu en la Sankta Bapto ricevis la nomon Herman Niajn sincerajn gratulojn al la gepatroj kaj brilan sanon al la etuloj.

Magda De Valck, unua filineto de nia delegito en Gent, mencias kun ĝojo la alvenon de frateto Dirk. Korajn gratulojn al la gepatroj kaj al Magda, kiu espereble bone interkonsentos kun sia nova konkuranteto.

## Geedziĝo.

La geedziga Sakramento ligis la 29an de novembro niajn geanojn, Gerard Libbrecht kaj Lea Vanhoutte en Oolegem. Ni deziras al ili ĉian feliĉon per Dia beno kaj esperas ke ili iom post iom varbos multajn geanojn de F.U.K.E. en sia propra familio.



VIRINA KORO de Maurits Sabbe, tradukis D. Mortelmans. Unuakta teatraĵo 26 paĝa, bela eldono. Prezo: 5 fr. Luksa: 10 fr.

Kiam nia vendestro estis laca, li iris al... la Virina Koro por traduki ĝin, kaj li pravis, ĉar li nun donas al ni bonegan tradukon de ludinda, emociiga kaj facile ludebla teatraĵo de unu el la lertaj nuntempaj flandraj teatraj-verkistoj. Esperu ni ke la temo — kiu estas eterna kaj internacia! — instigos multajn klubojn al prezentado de tiu teatraĵeto, flandra laŭ deveno, sed Esperanta laŭ la zorga traduko. Nur 2 eraroj ensoviĝis dum la kompostado:

p. 19 tiun kolerelverŝadon: anstataŭ tiu....

p. 21 fonfeso anstataŭ konfeso.

La aspekto de la libreto estas plaĉa, la papero bonkvalita, la tekstaranĝo klara kaj zorga. S-ro Vermuyten prijuĝis ĝin jene: «bele eldonita, mi legis ĝin kun plezuro, nun ĝi estas preskaŭ perfekta!»

Nederlanda Katolika kaj Espero Katolika ankaŭ laŭdis la belan eldonon. Ĉiu sekcio aŭ klubo akiru minimume 1 ekzempleron kaj ekzameni la ludeblecon. Vi tion ne bedaŭros!

Colo.

IV. — LANDO-DEFENDADO PER NE-MILITAJ PERILOJ de Prof. D-ro Fr. Daels. Eldonis K. J. V. A. Antverpeno. Prezo fr. 2.— ĉe nia Vendinstituto K. E. I.

Certe la enhavo multe interesos la esperantistojn kaj ni nur povas rekomendi la legadon de tiu broŝureto, 40 paga, formato 10 x 14, kiu donos al ni nevajn ideojn pri la estonta agado kontraŭ-milita.

Domaĝe ke la traduko estas farita tiel malklare ke ĉiuj tie: mi kelkfoje devis retraduki flandralingven por kompreni frazojn kiel ekz. p. 22: La unua kondiĉo... kaj p. 20: Se ni konsideras... Eraroj: p. 7 ni: havas la devon restigi(?). p. 10: parata(?) p. 13: Antaŭe ni atengis: iam ni atingis(?). p. 13: armituloj (kiaj mituloj?). p. 15: dimension ne estas «amplekson» en Esperanto. Legu tamen atente.

Colo.

IV. — COLOMBA de Prosper Mérimée. Eldono EPOKO. Sesa libro. Vidu prezon en Prezlisto K. E. I.

Feliĉe ke la eldonantoj elektis la ununuran taŭgan verkon de tiu por katolikoj malsimpatia franca verkisto. Li kapablas skribi streĉajn kolorplenajn rakontojn kaj ĉi tie temas pri la terura Kormiko kaj ĝiaj venĝaj kutimoj. Mi trovis multajn erarojn: p. 20 «da» anstataŭ «de». p. 58 kaj 80: «ne ankoraŭ» anstataŭ «ankoraŭ ne». p. 62 «sia» anstataŭ «lia». p. 60 fariĝis riproĉon. k. t. p.

Tipa loka priskribo kaj tial leginda libro.

Colo.

V. — RIĈA kaj SEN MONO de Philip Oppenheim, tradukis el la angla Fred Wadham. Eldono de Esperanto Publishing Comp. Prezo: 29 fr. Formato: 16 x 21. Paĝoj: 222. Bindita.

Vera distra romano de la lerta rakontisto Oppenheim kun bona tendenco, nome ke iu, kiu laboras kutime estas pli feliĉa ol ulo riĉa kiu ne scias kiel pasigi la tagojn. Oni kun plezuro vidas ke nia Bliss malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj fariĝas feliĉa homo, feliĉa edzo, feliĉa milionulo, post jaro de mizera kaj emociplena vivo. Multaj eraroj kaj te kaj tie influo de la angla lingvo. Mi miras pri la signifo de «maljunema» sinjoro? La eldonejo tamen meritas nian dankon ĉar ĝi alportis al ni libron, kiun ni povas legi facile sen troa okupo pri la gramatikaj aŭ literatura altflugado.

Colo.

JUBILEUM CURSUS VAN NIJMEGEN.  
26 Lessen van 8 mooi gedrukte bladen met woordenlijst.

Velen van ons leerden Esperanto door middel van de degelijke Centra Esperanto Kursu vande Nijmegen-Esperanto Commissie die tal van jaren ook door Hilversum uitgezonden werd. De prijs die in 1938 tot 65 beliep, werd in 1939 teruggebracht op 50 fr. vermits de radiocommentaar dit jaar ontbreekt. Deze cursus is onmiddellijk en volledig verkrijgbaar. Onlangs kreeg ik van 'n priester uit het

Antwerpsche volgende beoordeeling: «Niettegenstaande ik reeds verschillende cursussen doorgeemaakt had, bleven mij nog tal van detailkwesties onklaar. Na de studie van de Nijmegen Cursus zijn al die moeilijkheden klaar gemaakt».

Welnu, om al onze leden in staat te stellen zich deze cursus aan te schaffen, hebben wij een aantal cursussen van de Jubileum-Uitgave 1935 overgenomen en bieden deze ten uitzonderlijken titel aan onze lezers aan tegen 25 fr. franco toegezonden. Het aantal is beperkt, bestel dadelijk aan het K. V. E. V. Aalst, Postcheckrekening 412354.

MODESTA TE-DEUM PRI LA ORDINARA, de John Oxenham. El la angla lingvo trad. de Joab Eljot di «K». Multobligita broŝureto eldonita en Aŭstralujo.

Ĝi estas danka kaj laŭda himno pri Dio, certe bela. El klarigoj de la tradukinto(?) tamen priviĝas, ke li rigardas Kriston nur kiel «filozofon».

C. v. H.

II. — TAGIĜAS. Broŝureto de 8 paĝoj malgrandaj, enhavanta artikolon tradukitan el la revuo The Science of Thought Review.

En tiu artikolo oni asertas ke «malpravaj ideoj pri Dio, la homo kaj la universo, kaŭzis la nunan staton de la homo — malsana, difekta, malfeliĉa, malgaja kaj malriĉa — en menso aŭ en korpo aŭ en posedo». Ke nun tamen la nova tago komencaĝas, ke la homoj komencas kompreni, ke Dio ne estas kaŭzo kaj ne deziras, ke la homoj estu difektaj, malsanaj, malriĉaj, premegitaj de la ŝarĝo gajni vivsubtenon kaj ĝenitaj de financaj zorgoj, sed ke de tio estas la kaŭzo malpravaj ideoj pri Dio, homo kaj universo. Se tiuj ideoj estas bonaj ankaŭ la homoj kaj ilia stato pliboniĝas.

Certe vere estas ke multa mizero devenas de la malĝustaj ideoj pri Dio kaj religio, precipe de la neplenumado de la Diaj ordonoj. Sed ĉe bonaj ideoj kaj bona plenumado de la ordonoj la korpaj suferoj, kiel malsanoj ktp, tial kompreneble ne forrestos, ili ja estas sekvo de la hereda peko. Sed la verkinto de tiu artikolo ne atentis, ke estas granda diferenco inter suferi kaj esti malfeliĉa. Paj homoj en sia suferado ne estas malfeliĉaj; ili povas toleri tion pro amo al Dio kaj ili ankaŭ ricevas de Dio gracojn por tio, dum homoj nepiaj vere fariĝas malfeliĉaj de la suferoj.

Krom tio, solaj bonaj ideoj pri Dio, homo kaj universo ne sufiĉas por esti bonaj kaj obeaj al la leĝoj de naturo kaj Dio, kiel malprave verkinto supozas. Ili helpas al bona vivo, sed la homo posedas liberan volon per kiu la homo malgraŭ la plej bonaj ideoj povas malbone agi.

Alia falsajo en la artikolo estas jena diraĵo: «Ĉio kion havas la Patro, estas mia», diris Jesuo, kaj tio estas ankaŭ vera pri ĉiu el ni».

Tio ne estas vera por ni. Jesuo aludas tie ĉi al Sia Dieco kaj unueco kun la Patro. Sed kompreneble ni ne havas ĉion, kion Dio havas (perfektecon ktp.). La celo de la eldoninto estas tre laŭdinda sed la asertoj estas grandparte falsaj.

C. v. H.

# D I S T R A P A Ĝ O



Ĉi sube ni daŭrigas la serion de niaj enigmoj. Ni esperas ke multaj sin amuzos per tiu lerniga maniero kaj ke multnombre la solvoj envenos.



## ENIGMO No 12.

- |                         |                             |
|-------------------------|-----------------------------|
| o — o — — o o — — o     | 1. Grava homa ilo.          |
| o o o o o o — — o       | 2. Kiu varbas.              |
| o o — — — — — o o — —   | 3. Verbo, imperativa formo. |
| o o o — — — — o         | 4. Besteto.                 |
| o o o                   | 5. Kiu enhavas.             |
| o — o o — — — — — o     | 6. Kuracilo.                |
| o — — — — o o — — — — o | 7. Templimo.                |
| o o o —                 | 8. Rapide.                  |
| o o — o — — — o         | 9. Naŭza besto.             |
| o o — — — o o — — — o   | 10. Post peko.              |
| o o o o — — — o — — — o | 11. Rezulto de travivado.   |
| o — — — — — — — — — o o | 12. Loko.                   |
| o — — — o o — — — o     | 13. Estajo.                 |
| o o o o o o o o o o o o | 14. Bela lando.             |

Metu la literojn, kiuj formas la vorton, en la ringetoj.

En vertikala direkto estas ĉiam la sama litero. Solvo ensendota antaŭ la 1-a Februaro 1940.

## ENIGMO No 13.



Pere de la trilateraj grupoj plenigu la grandan figuron.

Se post pacienca kunmetado vi sukcesas, vi horizontale vidos bongustajn fruktojn.

Solvo ensendota antaŭ la 1-a Februaro 1940.

Rilate al la enigmo No 10, pluraj geensendintoj de la solvo rimarkis, ke enŝoviĝis eraro cifero en la ŝlosilvortoj. Eble pluraj klopodis trovi la solvon sed pro la eraro ne ĝin trovis. Ni tial plidaŭrigas la

tempo de ensendo de la solvo No 10 ĝis la 1-a de Februaro 1940.

Jen la korekto: anstataŭ la ciferoj 1 de la tria kaj lasta difino metu 7, kaj provu, denove vian ŝancon.

Pro la cirkonstancoj ni ankoraŭ akceptos la solvojn de no 10 kaj 11 ĝis la 1-a Februaro 1940 kaj post tiu dato aperigos la nomojn de la bonaj gesolvintoj.

## REDAKCIA LETERKESTO

**Tyneverum.** — Dankon por via poemo. Ni deziras ankoraŭ pli da ili. Kor. sal.

**Golobič Peter en Ljubljana.** — Sendu m. p. regule vian gazeton. Ni esperas ke vi ricevos regule ankaŭ nian revuon Kor. sal.

**S-ino Csermeki en Budapest.** — Dankon pro via poŝtkarto kaj promesitaj artikoloj. La kartoj pri Hungarujo ne alvenis ĝis nun. Via literaturajo aperos. Ni deziras al vi kompletan resaniĝon. Kor. sal.

**M. De Valck en Gent.** — Ni ne forgesis vian demandon. Pro diversaj motivoj ne estis eble publikigi la respondon. Verŝajne en la venonta numero. Amiko, do ankoraŭ iom da pacienco. Kor. sal.


La libro

kiun

ĉiu

Esperantisto

devas posedi



Verkita de: PROF. E. GROSJEAN-MAUPIN, direktoro de la sekcio « Komuna Vortaro » ĉe la Esp-ista Akademio; A. ESSELIN; S. GRENKAMP-KORNFELD; PROF. G. WARINGHIEN; membroj de la Esp-ista Lingvo Komitato.

NUR TIU PERSONO, KIU POSEDAS KAJ UZAS CI-TIUN VORTARON, MERITAS LA BELAN NOMON: **SERIOZA ESPERANTISTO!**

Prezo 70 fr. Vendoinstituto de F.U.K.E. Eg. Segerslaan 14. Wilrijk.

FUKE-leden uit het Antwerpsche !

Voor uw           

**Heeren- & Kinderkleding**

GEMAAKT EN NAAR MAAT

is het beste adres :

**J. PAESMANS**

**IN 'T DUIFKEN**

Koepoortstraat 64, Antwerpen. - Tel. 217.51

5 % AAN ONZE LEDEN !!

LIKEURSTOKERIJ

**DE RAAF**

■ ALLE SPECIALITEITEN ■

ALLE GEKENDE WIJNEN

**J.VANDEUN-JESPERS**

TURNHOUSCHE BAAN, 277

BORGERHOUT (ANTW.)

**PRESEJO**

**H. & H. BRAEKEVELT**

Statedreef, 177 - Tel. 1080

ROESELARE

Specialiteit :

**ESPERANTO - DRUKWERK**

**Atentu Esperantistoj !!**

Por modernaj domornamaĵoj,  
ŝtalaj mebloj ktp., por moderna aranĝo de  
via dominterno, ekzemple pentrado kaj  
tapetado, turnu vin al :

**CAMIEL TOUSSEYN**

dominterno-arkitekto.

domkolorigisto-tapetisto.

Hoogstr. 44, JABBEKE (W. VI.)

(laboras tra la tuta lando

10 % da rabato por Esperantistoj)

**HALT ! STOP !**

Het beste Woordenboek  
voor ieder Esperantist !

**GROOT WOORDENBOEK  
VOOR ESPERANTO**

door A. J. van Straaten

690 bladz. moderne linnenband, puik papier  
Prijs 80 fr. Katholiek Esperanto Instituut.

Steunt onze Aankondigers.

Zij steunen ons,

en hebben goede waar.



**SIGARENFABRIEKEN ROMANO N.V.**  
**GHEEL (Antw.)**

ALLEEN FIJNE KWALITEIT SIGAREN, IN ALLE PRIJZEN  
GROOTE KEUS. — HAVANA SIGAREN.

Prijskaarten en stalen van sigaren op aanvraag.